

Leterkesto, 4-a parto
Afero pri Sudetlando kaj blinda naciismo
Claude Gacond, 299-a radioprelego, 1969.07.02 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pluraj geaŭdantoj, kies leteroj aŭ poŝtkartoj ankoraŭ troviĝas en nia leterkesto, meritas perradiajn saluton kaj respondon :

A.- Sinjoro Gerard Van der Horst en Hago, Nederlando, bedaŭras sian invalidecon, kiu al li ne plu permesas partopreni la skiferion en Adelboden.

Cl.- Pluraj komencantoj ŝatas niajn elsendojn, kiuj ilin helpas en la lernado de esperanto. Sinjoro Henri Perriard en Chabrey, Svislando, kaj sinjoro Emile Bouvetier en Marseille, Francio, ricevu niajn salutojn. Tiu lasta loĝas en la fama domo **Le Corbusier**. Li sciis, ke Le Corbusier naskiĝis en la svisa urbo La Chaux-de-Fonds, kie ni laboras por la Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo kaj kie troviĝas la Ĉambro Edmond Privat. Bedaŭrinde la urbo La Chaux-de-Fonds, kiu etendiĝas en paŝteja regiono, ne montris multe da kompreno kaj simpatio por la avangardismo de Le Corbusier, kies vera nomo estis Edouard Jeanneret-Gris. Pro tio tiu genia arkitekto formigris al Francio, kie liaj kapabloj trovis pli facilan laborkampon. Hodiaŭ en La Chaux-de-Fonds estas organizataj retrospektivaj ekspozicioj pri la granda arkitekto kaj artisto Le Corbusier, sed estas iom malfrue, kaj tiu urbo posedas nenian veran tipan domegon de li, escepte vilaon, kiun li konstruis por siaj gepatroj en la junaĝo.

A.- El Britio salutis sinjoro Kable Singh en Southampton kaj sinjoro D. W. Bisset en Motherwell. Tiu lasta faras unu plendon. Aŭdu :

Cl.- « *Fine, mi devas fari unu plendon. Viaj elsendoj estas tro mallongaj ! Mi esperas, ke estontece vi pliampleksigos ilin. La enhavo de viaj programoj certe meritas pli grandan formaton.* »

A.- Ni dankas pro tiu komplimento kaj respondas, ke la esperantistoj havas la elsendojn, kiujn ili meritas. Kiam ili estos pli multnombraj kaj kiam ili pruvos tiun multnombrecon per regulaj skribaj rilatoj kun la diversaj elsendejoj, kiuj prelegas en esperanto, tiam tutcerte niaj programoj pliampleksiĝos.

Cl.- El Francio ankoraŭ salutis sinjoro A. Dumarquez en Arras, sinjoro Eugène Wermelinger en Buhl kaj sinjoro Pierre Friedlander en Suresnes. Tiu lasta, kiel multaj aliaj geaŭdantoj, tre ŝatis niajn prilingvajn klarigojn, kaj tute aparte nian prelegon pri la lingva daltonismo kaj la esperantigo de la franca vorteto **que**. Do ni revenos al similaj temoj.

A.- En Okcidenta Germanio ni deziras saluti sinjoron Bruno Gahler en Glinde, kiu okaze de la Homaj Rajtoj propagandas por la Sudetgermanoj. Tiurilate ni volas esprimi nian sintenon. Neniam finiĝos la interpopolaj konfliktoj, se ĉiu gento deziras ricevi propran apartan teritorion. La popoloj estas miksitaj, kaj ni devus ĉesi kulturi patriotismon, kiu kondukas al ŝanĝo de limoj, al rasapartigaj kvereloj, al nacia gloro, al popol-malamo. Kontraŭe ni devus kulturi supernacian patriotismon, kiu metas la homon super ĉiu alia idealo : ĉu eĉ la propra raso, la propra gento, la propra lando aŭ nacio. Ni devas vidi pli foren, ol ni mem.

Cl.- Sur via poŝtkarto, estimata sinjoro Bruno Gahler, ni legas :

A.- « *Mondo aŭskultu ! Tri milionoj da sudetgermanoj repostulas la rabitan hejmlandon !* »

Cl.- Jen tipe la voĉo de la plej blinda naciismo, kiu ĉiam kondukis al interhomaj buĉadoj. Estas lingvaĵo, kiu memorigas malamojn kaj gentmortigojn. Ĉu vere, ni, esperantistoj, povas partopreni en tiaj propagandoj ?

Leterkesto, 4-a parto
Afero pri Sudetlando kaj blinda naciismo
Claude Gacond, 299-a radioprelego, 1969.07.02 & 05

A.- Unu el niaj verkistoj, Edmond Privat, detalege analizis la intergentajn konfliktojn laŭ supernacia vidpunkto, kiun ni devus kulturi en ni mem. Aŭdu kelkajn parolojn de Edmond Privat :

Cl.- « *Ce rivaleco inter grupoj, la ĉefa oferato estas la vero. La plej etan okazaĵon ĉiu rakontas laŭ sia maniero. Ne nur tio. Inter la faktoj ĉiu elektas la plaĉantaj kaj emas memori nur tiujn, kiujn li ŝatas kredi. Poste li trograndigas ilin kaj traktas kiel mensogojn la flanke lasitajn. Kiam alvenis al tio du homoj, ĉio fariĝas malfacila. Inter grupoj, estas multe pli malbone. Inter nacioj, katastrofo. Nenia societo povas kunteniĝi sen ia minimumo de komuna vero. Por ĉiu, la sankta plafono de l' patrujo ludas la rolon de plej supera ĉielo. Nu, tiuj malsamaj ĉieloj kondutas kiel nuboj. Ilin al tondro puŝas la vento kaj ekfalas la hajlo sur ĉiujn popolojn. Por ke la blinda nacia fervoro trovu haltigan bremsan sur la vojo al katastrofo, necesus ia interŝtata moralo, baranta la sinpuŝojn kaj brutalajn kutimojn per aliaj pli mildaj kaj pli saĝaj moroj, kiaj ekzistas ja inter la anoj de iu ajn aro. Unuvorte, necesus kuna tegmento super la naciaj plafonoj. »*

A.- Sinjoro Bruno Gaher, via memor-karto, kiu repostulas la rabitan hejmlandon, pruvas, ke anstataŭ kulturi supernacian patriotismon, kiu nin kondukis al mondo, kie povus pace kunvivadi ĉiuj gentoj, vi kulturas patriotismon, kiu devige nin kondukos al nova katastrofo. Tio tero, kiun vi repostulas, ne nur apartenas al la sudetgermanoj. Tion vi bone scias. Sed pri tio vi silentas. Inter la faktoj vi elektis la al vi plaĉantaj. Meditu la dirojn de Edmond Privat legante lian libron *Interpopola Konduto*.

Cl.- Ni ne plu rajtas paroli pri la esperanta popolo, kio signifas pri nia aparteneco al io supera al la interpopolaj luktoj, se ni samtempe kulturas unu el tiuj luktoj. Kontraŭe ni devas eksperimenti la vojojn, kiuj povas konduki la tutan homaron al nova erao, kie la interpopolaj luktoj aperos kiel bruta infanismo. Per ĉiuj niaj fortoj ni ĉiam denuncos la naciismojn, kiel malamikojn de la homprogreso.

A.- El Okcidenta Germanio ankoraŭ salutis sinjoro Gerhard Kunze en Wittlensweiler, sinjoro F. W. Poppeck en Höchenschwand kaj sinjoro E. Preibisch en Köln, sur kies lasta letero troviĝas poŝtmarko kun la vorto **EUROPA**. Jes, anstataŭ batali por celoj, kiuj dividas la homojn, ni devas celi la unuiĝon. La konstruo de Eŭropo ankaŭ bezonas laborantojn.

Cl.- El Ĉeĥoslovakio, lando kiu estas koncernata de tiu Sudetafero, venis saluto de sinjoro Jiri Patera en Most.

A.- En Finnlando ni volas saluti skribeman aŭdantinon, fraŭlinon Olga Ihander en Pietarsaari, kiu regule nin informas pri la aŭdebleco de niaj elsendoj en ŝia norda lando. Tiuj informoj estas ĉiam utilaj al niaj teknikistoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-